

Тарас Григорьевич Шевченко ,
Testamento

tradukita de Ludmila Novikova

Kiam mortos mi, amikoj,
Mian tombon faru
En la stepo larĝe vasta
De Ukrajno kara:
Por ke vidu mi la valojn,
Dnepron kaj montetojn,
Por ke aŭdu, kiel muĝas
La river' impeta.
Kiam sangon malamikan
For de l' ter' Patruja
Portos ĝi al blua maro,
Mi ekstaros tuje.
Lasos ĉion kaj mem Dion
Mi atingos pie,
prenos verve ... Sed sen tio
Mi ne scias Dion!
Tombon faru kaj ekstaru,
Ŝiru ĉenon feran,
Kaj aspergu per tirana
Sango la liberon!
Kaj en nova familio,
Granda, bela, forta,
Ne forgesu remmemori
Min per bona vorto!

*Traduko de la Rusa poeto "Завещание" de ТАРАС ГРИГОРЬЕВИЧ ШЕВЧЕНКО (*1814-02-25 – †1861-02-26) en Esperanton de Ludmila Novikova.*

Arg-949-1913 (2014-01-03 13:25:33)

Tiun ĉi esperantigon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la revuo "Moskvaj Novaĵoj", prov-numero en Esperanto de Aprilo 1989. Pri la tradukinto vidu la retejon " ". La poemo troviĝas en la reto en http://ru.wikipedia.org/wiki/РЧРѠРђ_СҚРѠР,,РчРѡ_ (СФСЪРчСЖР«СЪРђР«СГРѡР,,РчРѡ) .